# Esperanto - La Bitbulteno 99

esperanto.es

## PROGRAMA Y SEGUNDO PLAZO DEL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO 2025

A finales de marzo termina el segundo plazo, con cuota reducida, para apuntarse al 83º Congreso Español de Esperanto, que tendrá lugar en Soria entre los próximos 1 y 4 de mayo. Te animamos a apuntarte, como han hecho ya más de 135 personas hasta el momento de enviar este boletín.

Recordamos que la web https://kongreso.esperanto.es/ dispone de la información práctica, incluyendo: sede, transporte, alojamiento, etc, que se va actualizando continuamente. Además, ya se ha publicado la primera versión del programa, que puedes encontrar aquí, con un horario (provisional) y una relación de conferencias previstas.

Se ha abierto además un canal de Telegram: https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, que puede servir para recibir actualizaciones sobre la organización y para que los participantes puedan comunicarse entre ellos.

El formulario de inscripción se puede encontrar en: https://kongreso.esperanto.es/. También puedes reservar las actividades del programa turístico, incluido el postcongreso del lunes 5. El Comité Organizador recomienda que reserves las excursiones cuanto antes, si es posible antes del final de este mes, para poder asegurar tu plaza y facilitar la organización.




## NO TE OLVIDES DE LOS EXÁMENES LIBRES DE ESPERANTO DE LA UNED

Como informamos en el anterior Bitbulteno, hasta el 31 de marzo está abierto el plazo de matrícula para hacer el examen libre de Esperanto en la Universidad Nacional de Educación a Distancia, en los niveles A2 y B1.

Mira todos los detalles, en este enlace.

## ÉXITO DEL CONCURSO DE IDEAS PARA LA DIFUSIÓN DEL ESPERANTO

El concurso de ideas organizado por una organización cultural con el apoyo del ayuntamiento de Cheste (Valencia) para la difusión del esperanto, del que informamos en su momento, ha finalizado con gran éxito, con la recepción de 38 trabajos procedentes de más de 20 países. El jurado hará público el resultado el 4 de abril, y los premios se entregarán en una ceremonia el 25 de abril en Cheste.

Más información en castellano y en valenciano.

Sociedad Cultural ATENEO LA ALIANZA — Ayuntamiento de Cheste, CONCEJALÍA DE EDUCACIÓN — fundación cajacheste

## SESIÓN DE ESTUDIO PARA JÓVENES EN BUDAPEST

Del 3 hasta el 7 de febrero del 2025, tuvo lugar una sesión de estudio en el Centro Europeo de la Juventud de Budapest. Organizada por TEJO (la Asociación Internacional de Jóvenes Esperantistas) en colaboración con el Consejo de Europa, el encuentro reunió a jóvenes de diversos países, incluida España (ver foto), para reflexionar sobre la inclusión, los derechos humanos y la discriminación.

El seminario fue un espacio muy adecuado para compartir ideas y experiencias. Se trató no solo de aprender conceptos, sino de sentir la importancia de la inclusividad en nuestra vida cotidiana y en nuestro rol social. Más que un evento, esta actividad fue una forma de recordar la importancia de la educación como un instrumento de transformación social. La inclusión y los derechos humanos no son solo temas de debate, sino principios que debemos vivir y hacer avanzar de manera cotidiana.



## NOVA ELDONO DE SATeH

La asociación Izquierda y Esperanto SATeH acaba de publicar la traducción al esperanto del libro “Contigo empezó todo” de Eduardo Pérez, colección de artículos en la revista digital "El Salto". El título elegido para la versión en esperanto es *"Historieroj el alia vidpunkto"* (Piezas de historia desde otra perspectiva).

El libro, escrito en un tono ligero, aborda diversos momentos de la historia española, desde otra perspectiva, subrayando las luchas sociales por un mundo mejor, lo que a menudo ha conllevado represión, dificultades e injusticias. Ese tono ligero posiblemente ayude a los lectores de otros países a comprender esta parte de la historia de España.

El libro será presentado y podrá ser adquirido en el congreso de Soria.

## COLECCIÓN DE RECORTES DE PRENSA SOBRE EL ESPERANTO

En la página web esperanto.es, en concreto en el repositorio digital, la Bitoteko, se ha creado una nueva sección: El esperanto en los medios, que se añade a las previas Biblioteca y Hemeroteca.

Se incluyen en ella los recortes de prensa que formaban parte de la colección y las apariciones en radio y televisión, que figuraban de forma dispersa. De esta forma la organización es más

clara y coherente, y su búsqueda resulta más fácil.

Puedes ya visitarla y acceder, por ejemplo, a los varios reportajes en prensa, radio y televisión con ocasión de las actividades en Segovia de las que informamos en nuestro anterior número y que aún continúan en marzo.




## ASAMBLEA GENERAL DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

El sábado 3 de mayo, durante el Congreso Español de Soria tendrá lugar la Asamblea Ordinaria de la Federación Española de Esperanto. Los socios recibirán en breve la convocatoria oficial, con el orden del día, los documentos oficiales y la forma de delegar el voto, para quienes no puedan asistir.

Te recordamos que puedes hacerte socio, participar en las reuniones y disfrutar de las ventajas fiscales y de otro tipo (incluyendo una rebaja en la cuota del congreso). Mira esta página para saber cómo. Bienvenidos.




## PROGRAMO KAJ DUA ALIĜPERIODO DE LA HISPANA ESPERANTA KONGRESO 2025

Fine de marto finiĝas la dua aliĝperiodo, kun pli malalta kotizo, por enskribiĝi en la 83-a Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Sorio de la 1-a ĝis la 4-a de majo. Ni kuraĝigas vin aliĝi, kiel jam faris pli ol 135 homoj en la momento de pretigo de tiu ĉi bulteno.

Ni memorigas ke en la retejo https://kongreso.esperanto.es/ vi trovos la praktikajn informojn pri sidejo, transporto, gastigado, ktp. Ĵus aperis la unua versio de la programo, inklude de la provizora horaro kaj informoj pri la antaŭviditaj prelegoj.

Oni krome malfermis Telegramkanalon: https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, kiu taŭgos por ricevi ĝisdatiĝojn de la organizado, kaj por ke kongresanoj povu interkomunikiĝi.

La aliĝilon vi povas trovi en la retejo https://kongreso.esperanto.es/. Vi povas rezervi ankaŭ la aktivaĵojn de la turisma programo, kiu inkludas postkongresan ekskurson la lundon 5-an de majo. La Organiza Komitato rekomendas ke vi rezervu la ekskursojn kiom eble plej rapide, se eble antaŭ la fino de marto, por povi konfirmi vian lokon kaj faciligi la organizadon.





## NE FORGESU LA LIBERAJN EKZAMENOJN DE ESPERANTO EN UNED

Kiel ni informis en pasinta Bitbulteno, ĝis la 31-a de marto restas malfermita la aliĝoperiodo de la "liberaj" ekzamenoj de Esperanto en UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia aŭ Tuthispana Neĉeesta Universitato), en la du niveloj A2 kaj B1, per kiuj vi povas akiri titolon de la lingvo sen neceso studi kurson se vi jam scipovas Esperanton.

Ĉiujn detalojn vi povas trovi (hispanlingve) en tiu ĉi ligilo.

UNED

## SUKCESO DE LA KONKURSO DE IDEOJ POR DISVASTIGO DE ESPERANTO

La konkurso de ideoj organizita de kultura asocio de la urbo Cheste (Valencio) kun apogo de la urbestraro, por la disvastigo de Esperanto, pri kiu ni informis antaŭ kelkaj monatoj, finiĝis kun rimarkinda sukceso: oni ricevis 38 laborojn el pli ol 20 landoj.

La ĵurio publikigos siajn konkludojn, kun la elekto de la premiitaj laboroj, la venontan 4-an de aprilo, kaj la solena premio-disdona ceremonio okazos la 25-an de aprilo en la urbo Cheste.

Pliaj informoj tie ĉi.

## JUNULARA STUDSESIO EN BUDAPEŜTO

De la 3-a ĝis la 7-a de februaro 2025, okazis studsesio ĉe la Eŭropa Junulara Centro en Budapeŝto. Organizita de TEJO en kunlaboro kun la Konsilio de Eŭropo, ĉi tiu renkontiĝo kunigis junulojn el diversaj landoj, inklude de Hispanio (vidu foton), por pripensi Inkluzivecon, homajn rajtojn kaj diskriminacion.

La studsesio estis kunvena spaco, loko kie oni dividis ideojn kaj spertojn. Temis ne nur pri lernado de konceptoj, sed pri sentado de la graveco de inkluziveco en nia ĉiutaga vivo kaj en nia socia rolo. Pli ol evento, ĉi tiu sperto estis memorigilo pri la graveco de edukado kiel ilo por socia transformo. Inkluziveco kaj homaj rajtoj ne estas nur debatotemoj, sed principoj, kiujn ni devas vivi kaj antaŭenigi ĉiutage.





### NOVA ELDONO DE SATeH

SATeH denove plenumis projekton konsistantan en traduko de hispanlingva verko, nome “Contigo empezó todo” de Eduardo Pérez, kolekto de gazetartikoloj publikigitaj en hispana gazeto "El Salto". La titolo de la esperanta eldono estas "Historieroj el alia vidpunkto".

Per malpeza tono la aŭtoro klopodis por elekto de gravaj momentoj de la historio de Hispanio kun alia alrigardo, en kiu oni substrekas la baraktoj cele al luktado por pli justa mondo, kio plej ofte rezultis en subpremado, malfacilaĵoj kaj maljustaĵoj. Tiu malpezeco eble helpas nehispanojn kompreni tiun rigardon al la hispana historio.

La libro estos prezentita en la kongreso de Sorio, kaj vendiĝos je prezo de 10 eŭroj tiam kaj poste ĉe SATeH.




### ESPERANTO EN LA AMASKOMUNIKILOJ

En la retejo de HEF, konkrete en la Bitoteko, estis kreita nova sekcio : *Esperanto en la amaskomunikiloj*, kiu aldoniĝas al la jamaj *Biblioteko* kaj *Gazetoteko*.

Tie kuniĝas nun la gazeteltondaĵoj, kiuj antaŭe konstituis kolekton de la sekcio *Biblioteko* kaj la aperoj en radio kaj televido, kiuj antaŭe respektive disis en la kolektoj de sonregistraĵoj kaj videoj, ambaŭ apartenantaj al la sekcio *Biblioteko*. Tiel la organizo de tiuj specifaj dokumentoj estas pli klara kaj kohera kaj, krome, ties rekuperado rezultos pli facila.

Vizitu ĝin, kaj rimarku la multajn lastatempajn aperojn, ekzemple la plurajn raportojn en ĵurnaloj, radio kaj televido okaze de la aktivaĵoj en Segovio pri kiuj ni informis en la lasta numero.




### ORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La sabaton 3-an de marto, dum la Hispana Kongreso de Sorio okazos la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. La anoj baldaŭ ricevos la oficialan kunvokon, kun la tagordo, la

oficialaj dokumentoj kaj la instrukcioj por delegi la balotrajton, se oni ne povas ĉeesti.

Ni memorigas vin ke vi povas aniĝi al la Federacio, kiel individua membro, partopreni la kunvenojn kaj ĝui avantaĝojn fiskajn kaj alitipajn (inklude de reduktita kotizo por la kongreso). Legu tiun ĉi paĝon por scii pli. Estu bonvenaj!